

Hungara Scienca Akademio
Lingvosciencia Instituto
1068 Budapeŝto, Benczúr u.33.
Poŝtadreso: 1399 Budapeŝto, Pf.:701/508
Telefono: 321-4830
Fakso: 322-9297
Retadreso: linginst@nytud.hu

25/K/2003.01.29.

Al sinjoro
Csaba Székely

Baja
Kölcsey u. 72. II. em. 7
6500

Estimata sinjoro Székely!

Responde al via letero, datita la 24-an de januaro 2004 mi informas vin pri la sekvaj faktoj.

Laŭ la unuvoĉa opinio de gvidaj fakuloj de la Lingvosciencia Instituto de la Hungara Scienca Akademio, Esperanto apartenas al la kategorio de vivaj fremdaj lingvoj. Krom tio, laŭ la pli preciza priskribo kaj klasifiko, kiu konsideras la nunan staton de la lingvo Esperanto kaj ties historion, Esperanto estas a) grandmezure normigita, b) forte ensociiĝinta, c) ne etna vivanta lingvo, kiu en duavica lingva komunumo plenumas ĉiujn eblajn lingvajn funkciojn kaj samtempe rolas ankaŭ kiel peranta lingvo.

Ĉi supraj asertoj respegulas la sciencan starpunkton de nia Instituto. Kiel esplor-instituto, kompreneble ni ne posedas aŭtoritatan jurisdikcion, do fari konkludojn rilate al la kvalifikaj postuloj estas tasko de la Ministerio pri Edukado kaj de la Instituto por la Akreditado de Lingvoekzamenoj.

Pri ĉio ĉi ni informis sinjoron ĉefsekciestron Zsolt Szövényi en nia letero datita la sesan de januaro.

Budapeŝto, la 29-an de januaro.

Respektplene:

Zoltán Bánréti
vicdirektoro